

LA VERDA LUPEO

25-jaro



16(95) INFORMILO DE ELF-AREK - Decembro 1993



16-a universala kongreso de esperanto WIEN 1924











Pekina Esperanto-As.
P. O. Box 1089,
Beijing - 100034.

S-ano Rudolf Burmeister
pere de s-ano Qin Kaiji
10 lou 1 danyuan 3 hao
21 hao


Cai Yuanpei (1868 - 1940) partoprenis tiun UK en Vieno.





Frau Hermine Dauhelovsky in Wien IV Argentinierstr. 55/4

La aŭstra speciala stampo de tiu kongreso.



Parolas la redaktoro okaze de

NOVA JARO 1994

Tion ja faras ĉiuj ŝtatprezidentoj kun pompaj kaj kun preskaŭ ne plenumeblaj promesoj. Mia intenco estas, danki al ĉiuj tiuj, kiuj en 1993 restis fidelaj al nia ELF-AREK en la mondo de la filatelio. Al ĉiuj,kiuj aktive helpis per alsendo de informoj kaj materialoj sekurigi aperon de nia "Fenikso/La Verda Lupeo" . Krome al ĉiuj tiuj, kiuj energie kaj kun entuziasmo realigis organizajn laborojn por nia ELF-AREK. Mi ne kuraĝas elstarigi iujn nomojn, estus tro longa listo. Tralegu atente nian LVL kaj vi trovos ĉiujn nomojn, kiujn mi celas. Se ne alvenas viaj informoj, tiam ni ne povas aperigi nian LVL. Do, mi tre deziras, ke vi ĉiuj trapasu agrablajn horojn dum la Kristnaska Festo kaj la transiro al la novas jaro 1994 en la rondo de via familio kaj/aŭ geamikoj. Feliĉon kaj sanon kaj antaŭ ĉio Pacon sur la Tero deziras via

Rudolf [signature]

Ankaŭ mi, kiel kompilanto kaj ekspedanto de la LVL, deziras al ĉiuj membroj la saman.

[signature]

NI PRI NI



Pri la adresaro de ELF-AREK

Kelkaj el vi demandis pri la planita nova adresaro. Ni jam estas ĉirkaŭ 150 gemembroj. Dum la "estrar-kunsido" de ELF-AREK dum novembro 1993 kun Paulsson, Beau, Hirsch kaj la redaktoro, post iom da diskutoj, ni decidis aperigi nomaron pri niaj membroj, sen adresoj. Simple pro la oftaj misuzoj de nia malnova adresaro. Tiel ni klopodas eviti al iuj el niaj membroj malagrablaĵojn.

Pri kotizoj

Jam kelkfoje ni devis skribi pri tio. En ĉi-tiu jaro eble 60 de niaj membroj forgesis la pagon. Vi certe komprenas, ke ne eblas al ni, tamen daŭrigi la alsendon de LVL, kion ni ĝis nun faris. Tio rapide malplenigas nian kason kaj finfine la pagintojn trafus puno, ĉar ni uzas iliajn pagojn por la nepagintoj. La plej malbona afero: la plej multaj nepagintoj eĉ tute ne reagas al admonoj, kiujn ili intertempe parte jam la duan fojon ricevis. Se vi trovos ruĝan etikedon supre, tiam mankas ankoraŭ via kotizo por 1993. Se vi tamen jam pagis, tiam informu la kasiston, kien kaj kiam vi pagis. La nepagintoj ankaŭ ne reagas

aŭ per leteroj aŭ minimume per informoj al la redaktoro pri novaj E-filatelaj objektoj en iliaj landoj. Temas ankaŭ pri novaj tutaĵoj, pri glumarkoj kaj ankaŭ pri insignoj. Bv. sciu, ke mi kiel redaktoro, tute ne havas rilaton al la kaso de ELF-AREK. Estas sole nia amiko Beau, kiu akceptas kotizojn kaj kiu devas pagi la preskostojn, kovertojn kaj ekspedkostojn de LVL. Tiuj kostoj ne estas malaltaj.

Iom pri la membro-statistiko

De nia kasisto Rolf Beau mi laste ricevis liston kun nomoj de niaj membroj. El tio mi kompilis liston pri niaj membroj. Mi uzas por la landnomoj E-mallongigojn, kelkfoje ne korektaj, ekz.: SU kaj CS. Multaj ne pagis 1993, inter ili eĉ pluraj el "pagipovaj landoj" "Adresaron (nomaron)" ni do nur povas fari post "purigo" de la nuna listo:

FIN: 1, DAN: 3, USA: 2, JAP: 3, AUS: 3, BUL: 3, CS: 7, KOR: 4, HUN: 3, NED: 6, HIS: 4, CIN: 19, NOR: 1, BRA: 4, BEL: 4, SVE: 12, GER: 28, LIT: 1, POL: 11, FRA: 18, ITA: 8,

Do, sume 156 membroj en 25 landoj.

Krome menciindas, ke la Germana Filatelista Asocio abonis 23 ekzemplerojn de nia LVL. Ricevantoj estas: laborgrupoj (inter ili ankaŭ la Germana Filatelista Klubo en Novjorko), muzeoj, filatelaj bibliotekoj kaj redakcioj de filatelaj gazetoj.

KLUBANOJ SURVOJE



Nia prezidanto survoje


Leipzig, Chemnitz, Karlovy Vary, Bad Hersfeld: tiuj urboj estis la stacioj de nia Ivar Paulsson dum lia novembra vojaĝo. Li gastis ĉe Beau, Hirsch, Beau kaj ĉe la redaktoro. Lasta ŝoforis lin tra nebulo, neĝo, pluvo kaj dum nokto.

Fortajn impresojn li havis ĉe Hirsch, kiu prezentis al li nekredeble abundan materialon: bildkart-, glumark-, stamp-kaj tutaĵkolektojn, krome lian filatelan konkuran ekspozaĵon. Krome li havas ampleksan arĥivan materialon.


Ĉe Beau ni povis admiri la modernan membro-administradon, afero, kiu min ankoraŭ neniam interesis.

Ni devas kore danki al la geedza paro Hirsch kaj al la geedza paro Beau, kiuj nin afable akceptis kaj akompanis. La tuta vojaĝo daŭris unu semajnon kaj fakte estis "estrarkunsido", okazinta en tri urboj.

Kara amiko Paulsson, ni estis tre ĝoja pro via vizito kaj dankas al vi, ke vi vizitis nin!



STAMPOJ





La nova sta.

Glumarkoj (1933) en diversaj koloroj

TJ-1993 - ??? E-a batalslogano en Ĉinio

Beijing, 1993 sept 10. Teksto en Esperanto: LA 60-a PREZENT - DATREVENO DE LA DEVIZO "PER ESPERANTO POR LA LIBERIGO DE ĈINIO".
Bildo: Torĉo kaj E-flago super mapo de Ĉinio. Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing. Iniciatis: Ĉin Kajĝi. Uzita de Pekina Xiqua-PM-Kompanio.

Klarigo: En la dua kongreso de Ŝanhaja E-Asocio, okazinta 10-an de septembro 1933, estis prezentita la devizo: Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio. Ĝi estis unuanime akceptita de la kongresanoj. La 18-an de septembro 1931 la imperiestra japana armeo milit-invadis Manĉurion. 20 ĉinaj E-aj asocioj en oktobro 1931 subskribis la apelacion "Nia Manifesto" por protesti kontraŭ la invado. Ĝi aperis kun eldonkvanto de 8500 ekzempleroj. Komenciĝis longdaŭra batalado de la revoluciaj ĉinaj Esperantistoj kontraŭ fremdlanda okupado kaj enlanda reakcia regado.
Fonto: Historiaj notoj de ĈKĜ en lia letero de 1993 09 11 al la redaktoro.

Vd. ankaŭ LVL/Fenikso 68, paĝoj 4/5 kaj 12.

(maldekstre supre: la glumarkoj de 1932, eldonitaj de la Ŝanhaja E-ista Ligo. Krome la priskribita speciala stampo.)

Hazarde trovitaj novaj ĉinaj stampoj

En EPĈ 11/93 mi trovis sciigojn pri du E-stampoj de majo 1993 kun bildoj: EPĈ skribas:



simila sta kun la sama teksto jam ekzistas de Changzhu

"...La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis la poŝtmarkseriojn: "La I-a Orient-Azia Sportkunveno" kaj "La Patriotaj Demokratoj de P.R.Ĉinio" la 9-an kaj la 15-an de majo 1993.

La 25-5-1992 la Haikou-a Poŝtmark-Kompanio de Hainan-provinco uzis poŝtstampilon en Esperanto kaj la ĉina lingvo: LA 50 J. DE PUBLIKIGO DE PAROLADOJ ĈE LITERATUR-ARTA KUNSIDO EN YAN-AN" Projektinto estis: s-ano Zhang Linrui (Gang Linrui)..."

Pri tiuj 3 stampoj ankoraŭ ne alvenis informoj de niaj ĉinaj klubaj amikoj, kvankam jam estas novembro 1993. Supozeble

ankaŭ aliajn novajn pm-seriojn akompanas E-stampoj, sed ĝisdate mankas informoj ĉe la redaktoro kaj ankaŭ ĉe la eldonanto de la katalogo.

Pri la 78a UK en Valencio



Venis ankoraŭ informoj de nia hispana FOLGADO pri tiu UK: LKK pretigis dekorajn kovertojn kaj kartojn por la UK. La firmao ALFIL ne plu aperigis la dekorajn kovertojn.

Ni dankas al nia kluba membro FOLGADO pro la informoj kaj materialoj.

Jen pli klara sta Via instigo pri aperigo de biografietoj pri ELF-AREK-anoj estas interesa kaj mi klopodas iom post iom realigi ĝin, se min atingos ĉi-rilataj informoj. Sendu, mi petas, viajn arkivajn materialojn kaj datojn pri lla personoj, de vi proponitaj. Mi ne havas arkivon! Bv. korektu mian poŝtkodon!

63-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

Nia Elda Dörfler informis, ke tiu maŝinstampo estis uzata, laŭ





ŝia sciio, dum la 27-a kaj 28-a de aŭgusto. La stampo kaj la ilustritaj kartoj desegnis la triesta pentristo Augusto Bartoli. Dankon al s-ino Elda Dörfler pro la informoj kaj kartoj!

(Por la kolektantoj de ilustritaj poŝtkartoj: mi konas du: pri Preĝejo kaj Kastelo.)

Pri la stampo de la 65-a SAT-kgr en Kaunas

RETOUR

La 65 Kongreso de SAT
05.08.1992.-15.08.1992. Kaunas
Litovia Agrikultura Akademio

KAUNAS
920815
LIETUVA

LIETUVA

Unbekannt / inconnu
Annahme verweigert / refusé
Verstorben / décédé
Ungenügende Anschrift / insuffisance d'adresse
Abgereist (ohne Angabe der Adresse) / parti (sans laisser d'adresse)

LIETUVA

Wertpapierdruckerei Leipzig III 18 185

65 KONGRESO de SAT LITOVIO·1992

S-ro
R. Burmeister
~~Müllerstr. 30~~
~~9010~~
D-O-~~9047~~ Chemnitz

LA 65-A KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
05. 08. 1992.—15. 08. 1992 LITOVIA AGRIKULTURA AKADEMIO

Venis pluraj demandoj, ĉu la rektangula stampo pri tiu kongreso estas poŝta, ĉar ĝi troveblas sur iuj poŝtkartoj. Tiu sta ne estas poŝta, sed farita de LKK.

Demando al la Litoviaj klubamikoj: Cu la "Litovia Agrikultura Akademio" estis la kongresejo?

BG 30 -- SAT - Kongreso en Kazanlak

De nia Hans Jankowski atingis min, nur post la redaktofino de la lasta LVL, letero el la "Suna Bordo" de Bulgario kun interesaj informoj pri la 66-a SAT-Kongreso en Kazanlak.

Fakte tie estis poŝta E-stampo kun bulgarlingva teksto:

66-a Esperanto-Kongreso SAT, la dato: 14-21.8.1993, 6100 Kazanlak. Feliĉe, ke li aldonis tiun sta sur nova TUT-koverto. Pri ĝi sub: tutaĵo. Tie ankaŭ estas la bildo.

Tiun kongreson partoprenis ĉirkaŭ 220 personoj. Sekvontaj kongresoj estas planataj por 1994 en Ĉeĥio, 1995 en Slovenio kaj 1996 en Ruslando (St. Petersburg).
Ni dankas al la kongres-organizintoj. Ili sub tre malfavoraj ekonomiaj k.a. aliaj cirkonstancoj realigis eĉ E-filateliajn objektojn.

A F R A N K S T A M P O J

Variaĵo de la AF el Bad Hersfeld

Pro la poŝtkoda reformo en Germanio tiu AF ricevis novan datstampon kun la nova poŝtkodnumero: 36251. Vi ĉiuj jam ricevis ĝin, ĉar nian LVL ni ja ekspedas kun tiu AF. La afrankmaŝino estas posedaĵo de Germana Esperanto-Asocio (ne de ELF-AREK). Kvankam nia kluba amiko Hirsch jam dum majo 1992 demisiis kiel ĝenerala sekretario de tiu asocio, li ankoraŭ uzas la afrankmaŝinon, la fotokopiilon kaj la komputilon. Li bezonas ankoraŭ tiujn aparatojn por al li restantaj laboroj por GEA, ekz. la forsendo de "Esperanto aktuell". La oficejo estas unu ĉambro de la loĝejo de Hirsch kaj estas lia "regno". Tial ni ĉiuj regule akiras tiun AF.











Informoj de Hirsch: La unua tago de la nova datstampo estis la 15 07 1993. Nur la liverado de la nova datstampo kaj la muntado kostis iom pli ol DM 300,--.



E-POŜTMARKOJ

Pri rareco de iuj E-PM

La pinton de rareco inter niaj E-PM atingis tiuj de "ALEXANDERSTADT". Jes, ili troveblas sur la merkato, malofte, sed akiri ilin al neniu inter ni ne eblas, simple pro la altaj prezoj!

Temas pri surpresoj sur pm de SU el la jaroj 1930/31 kun la bildo de la "Centra Telegrafo".

La pm kun tiu surpreso validis de la 18 08 1941 ĝis 16 06 1942. Temas pri la "Ukraina Poŝto", do interima eldono, ĝis kiam estis instalita de la "Germana Civila Administrado" la tiel nomata "Germana Servo-Poŝto".

En la fama germana "Michel-Katalogo" ili estas registritaj sub: "Germanaj okupaciaj eldonoj 1939/1945, terotorio "Ukraino". En la listigo la pm kun "Esperanto" havas jenajn numerojn:

Kat.-Nr: 12 (SU 392x)
malhelblua
x kun FG 7
** 15.000,-- ⊙ 15.000,--

y kun FG 11
** 15.000,-- ⊙ 15.000,--

Kat.-Nr: 15 (SU 392y)
malhelblua
** 800,-- ⊙ 25.000,--

renversita surpreseo:
aŭkcia ofertprezo: DM 30.000,--

De la kat.-Nr: 15 ekzistas ankaŭ ekzemplero kun duobla surpreso, sed ankoraŭ ne katalogita, ĉar ĝis nun nur 1 ekzemplero estas konata (DD).

La supre menciitaj prezo nur estas <u>katalogaj prezoj</u>. La aŭkciaj prezoj tre varias. Kelkaj ekzemploj:


12 y: DM 2.800,--; DM 4.500,--; DM 6.500,--; DM 7.500

15: DM 6.000,--; 15 renv. surpr.: DM 10.000,--; 15 DD: DM 7.500,--



12 y





Filigranoj (FG)

FG: 7
Meanderdesegno kun floroj

FG: 11
la kirilaj literoj: ЗГ multoble spegulrenversite.

TUTAĴOJ



Germana filatela gazeto pri "La Esperanto-tutaĵ-poŝtkartoj de GDR

Hirsch sendis al la redaktoro grandan sendaĵon kun ĉi-jaraj germanaj filatelaj gazetoj. En unu el ili mi trovis artikolon de la filatela spertulo: Franz STRANSKY pri la tiel nomataj tutaĵoj de la kategorio "C". Temas pri poŝtkartoj, faldkovertoj aĉetitaj ĉe poŝtaj giĉetoj. Ili ricevis komisie de oficejoj, de firmaoj, laborgrupoj, filatelaj asocioj kaj aliaj, surpresaĵojn. La tutaĵkatalogo de iama GDR notas ilin sub la kategorio "C".

Tiujn "C"-tutaĵojn laŭ opinio de Stransky estas: <u>l a p l e j m a l ŝ a t a t a j t u t a ĵ o j.</u> Tuj poste li skribas: "... ili <u>tamen ofte plenumis gravan</u> filatelan funkcion kaj ili estas tiom

aĝaj kiel la unuaj tutaĵoj. La tiel nomataj "Mulready", kiuj ricevis privatajn surpresaĵojn, hodiaŭ estas tre serĉataj de filatelistoj.




Stransky dediĉas en sia tre ampleksa artikolo ankaŭ ĉapitron pri la "Esperanto-tutaĵoj de iama GDR" Li skribas: "... Ne mirigas, ke ni renkontas grandan nombron da E-tutaĵoj de iama GDR, ĉar la E-istoj de iama GDR, ofte ankaŭ estas filatelistoj, kiuj havis kontaktojn kun iliaj eksterlandaj partneroj, ĉefe per korespondado. F r a n d a ĵ o por ekspozaĵoj estas la E-tutaĵo okaze de la ĉiujara "Tago de la E-Libro" kun la koncernaj E-stampoj. Ĉu Faust, Švejk, La Rabistoj aŭ Neĝa Blovado: ĉiuj estis volonte akceptitaj..."

Pri Stransky: Li ne estas E-isto, sed tre fama filatelisto en Germanio. Prezidinto de la iama "Klubo de Tutaĵkolektantoj de GDR". En la distrikto Halle (iama GDR) li estis ĉefo de "Kulturligo" kaj forte subtenis la E-movadon tie.
(Supre la 25 fen. TUT pri "La brava soldato Svejk")

| Tutaĵpoŝtkarto de SU el la jaro 1921 |

Nia Hirsch trovis nun (neuzitan) rusan TUT-pk



«Lasta Posto»
eliras ĝuste la 15-an de ĉiu monato.
№ 2. Septembro. № 2.

S. E. U.

Estas organizitaj junulara (Vitebsk, str. de Esperanto, 10.0) kaj studenta (Petrograd, Italjanskaja, 31) sekcioj de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo.

Estas organizata eldona fako, informa fako, literatura sekcio de C. K. S. E. U. kaj Sovjetlanda Esperantista Servo.

Nia Kooperativo...

Lastatempe aperis jenaj eldonaĵoj de l'Kooperativo S. E. U.: «Esperanto-rusa radikaro», «Adresaro de Sovjetlandaj esp. organizaĵoj». Murtabeletoj kaj «Agitanto» № 3—4.

Helpu al malsatantoj:

Organiziĝis Tutruslanda Esperantista Oficejo por helpi al malsatantoj de Apud-Volga regiono.

Oficejo atendas tutmondan geesperantistaron subteni la iniciativon. Adreso de la Oficejo estas: Petrogrado (Rusio), Italjanskaja, 31.

Frata helpo.

Niĵni-Novgorodaj samideanoj aranĝis la 22-an de aŭgusto esperantan koncert-spektaklon.

Profito sume 187.000 rbl. estas transdonita al loka komitato por helpi al malsatantoj

PRAHA Kongreso.

La XIII-a sukcesis. Ĉeestis 2500 delegitoj el ĉiuj landoj.

XIV-a.

Laŭ decido de Praha Kongreso la Dekkvara okazos en Helsinki (Finnlando).

Laborista Esperantista Unuiĝo.

En Dresden (Germanio) la 28-an de Julio okazis internacia antaŭkongreso de laboristaj esperantistoj.

En akceptita rezolucio oni konsideras, ke la klasa kontraŭstaro de la kapitalista socio ankaŭ enigis en la Esperanto-movadon, kaj ke la uzo de Esperanto forte akcelas la proletarian movadon por la fina liberiĝo de la laborista klaso.

La Dresdena kunsido de esperantistaj laboristoj aprobis la statuton de «Liberiga Stelo».

Esperantaj gazetoj.

«Komunist-Esperantisto». — R. Arco Marques d'Alegrete, 30—2°. D. Lisbono (Portugalio).

«Agitanto». — Rusio, Kronstadt, Visokaja ul., 27 loĝ. 2.

«Эсперанто газета». — Rusio, Tomsko, per. Plehanova, № 4.

Adreso: Kronstadt, poŝtkesto 913.

kun surpresita dorsflanka "gazeto": LASTA POŜTO" de septembro 1921, N-ro 2. Temas pri unupaĝa informilo de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo"., kiu informas pri la Laborista Antaŭkongreso en Dresden 1921 (antaŭ la fondiĝo de SAT dum la 13-a UK en Praha). pri Frata Helpo de Apud Volga Regiono kaj pri SEA.

Kiu posedas similan, eble n-ro 1 aŭ 3?

TUT-poŝtkarto el la urbo Drogobič de Sovetunio

Львовская область, г. Дрогобыч.
Гостиница „Дрогобыч".
Львівська область, м. Дрогобич.
Готель „Дрогобич".
Фото Г. Бєлашев

Drogobic situas apud verdaj Karpatoj, ... estas grava industria kaj kultura centro de okcidenta Ukrainio. Nia samurbano ... Kotermak (Drogobic) en la jaro 1481 estis rektoro de Bolonja universitato (Italio). studis en nia urbo famaj verkistoj Ivan Franko, Vasil Stefanik, Les Martovic. en urbo funkcias pedagogia instituto, dramteatro, muzeoj.

Apud nia urbo situas fama kurorto T... skavec (1 km), kie dum jaro kuracas sin preskau 300000 homoj el tuta Sovetunio.

Loka esperanto-klubo havas 80 anojn. Nia kluboo deziras havi bonajn kontaktojn kun esperantistoj de tuta mondo.

Куда

Кому

Индекс предприятия связи и адрес отправителя

Vasil Stanovic

Ni jam pere de nia LVL foje informis pri tiu bildpoŝtkarto (ilustrita karto ?)kun surpresita E-teksto. Hodiaŭ eblas prezenti ĝin al vi. Eble ankaŭ vi siatempe ricevis tiujn bpk-ojn, eble eĉ kun aliaj vidaĵoj? Nominalo de tiu bpk: 3 kopekoj.

Rimarko de Hirsch: Laŭŝajne nur temas pri ilustrita poŝkarto (kun enpresita pm)kun privata alpreso, do ne bildpoŝtkarto. Bildpoŝtkartojn (en serioj) eldonis ekz.: Aŭstrio, Liĥtenstejno, Nederlando kaj aliaj)

TUT-pk kun E-surpreso "POSTA KARTO" de 1990 el SU (?)

საფოსტო ბარათი
ПОЧТОВАЯ КАРТОЧКА POŜTA KARTO
МЕТЕХИ-МУЗЕЙ ИСКУССТВ ССРГ ТИФЛИС

28.01.90.

Kara amiko!

Mi estis agrable surprizigita, kiel alvenis tia malnova presaĵo de Vi. El tuta koro mi dankas ...


Al estimata sinjoro
Istvan Fekete
Ditroi Mor str. 3. II. 6/a

Nia amiko Fekete sendis al la redaktoro, senkomente, kopion de tute ne konata E-a TUT-poŝtkarto. Ĝi ŝajne aperis en la jaro 1990. La enhavon mi ne komprenas, ĉar mi ne scipovas la rusan lingvon. Kiu povas doni klarigojn? Kiu ankaŭ ricevis ĝin?

Rimarko de Hirsch: Povas esti, ke temas pri ilustrita poŝtkarto(?). La pk ŝajne estis eldonita de iu muzeo (estas la adreso tie), kiu eble estis fondita dum la jaro 1935.

| Nova TUT-kov el Bulgario |

Nia Hans Jankowski sendis "kongresan koverton" de la 66-a SAT-kongreso en Kazanlak. Temas pri malnova 5 stotinka koverto, kies surpresita pm montras la emblemon de "Popola Respubliko Bulgario". Apud tiu estas alpresita dua pm de 95 stotinkoj de BULGARIO kun poŝtaj kornoj.



Dorsflanke la vendoprezoj: 1989: 8 stotinkoj kaj "nova prezo 1993": 127 stotinkoj (1,27 levoj). Supozeble temas pri enlanda tarifo, ĉar sur la koverto de Jankowski (kiu entenis la TUT-kov) gluis pm de nominalo de 800 stotinkoj (1989 necesis afranko de 13 stotinkoj). El tiuj "poŝtaj faktoj" montriĝas parto el la kialoj pri la disfalo de E-movado en Bulgario. Nia nova TUT--kov havas verdan alpreson: vd. la bildon. Mi timas, ke ekzistas intertempe jam aliaj, por ni nekonataj, E-TuT-ajoj. Se vi konas aliajn, bv. skribu pri ili al mi! Al bulgaroj mi resendos IRK por la poŝtaj elspezoj. Dankon al nia Hans Jankowski pro la senditaj salutoj kaj informoj. Noto: Eldonkvanto: 6000 pecoj; venditaj dum la kongreso: 2000. Ankoraŭ haveblaj de la E-grupo Kazanlak. Adreso nekonata. Nepre aldonu IRK por la responda afranko.

FAMAJ ESPERANTISTOJ



| Zhang Tai-yan kaj Song Jiao-ren (Ĉinio) |

Nia ĉina amiko Gao Zhen-xing trovis interesajn faktojn en la ĉinlingva libro "Esperanto-movado en Ĉinio" (paĝo 21: "...1908: Zhang Ji el Tokio gvidis E-kurson en la eldonejo de la gazeto "popola

ĵurnalo". Partoprenis la lernadon Zhang Taiyan, Song Jiao-ren ... k.a."

Zhang kaj Song estis poste elstaraj personoj dum la ĉina revolucio de 1911.

NET 104 (1991)







Troveblaj estas iliaj portretoj sur pm, serio J-132 (3-3), pri Zhang kaj sur la pm, serio J-182 (3-3), pri Song

La 40-fena pm pri Zhang posedas ankaŭ du ideogramojn por "Popola ĵurnalo", en kies eldonejo ili lernis Esperanton.

Ĉi-loke mi atentigas ankaŭ pri Cai Yuan-pei (ni jam detale informis pri li), kiu ankaŭ apartenis al la famaj gvidintoj de la revolucio en la jaro 1911.

Mi tre dankas al nia ĉina amiko Gao Zhang-xing pro la alsendo de la supraj informoj kun koncernaj pm.

El la historio de E-kolektantoj (-asocioj)



Georges Saget (1882-1968)

Ankaŭ nia Amouroux reagis je nia ĉi-rilata artikolo en LVL: "...Menciindas la nomo de Georges SAGET (1882-1968), kiu verkis multajn artikolojn pri la E-filatelo en "Franca Esperantisto" kaj oftaj informoj en la ne-Esperantistaj, sed gravaj francaj filatelaj gazetoj kiel "Le Timbre" (La Poŝtmarko) kaj "Le Monde des Philatelistes" (La mondo de la filatelistoj). Krome li kompilis du katalogojn pri E-pm kaj E-TUT-aĵoj , kadre de "La Interligilo" (monata centra organo de fakinformoj, eldonita de la "Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomuniko kaj Transportoj)

Li posedis unu el la plej gravaj kolektoj, ne nur pri la E-filatelo, sed ankaŭ pri E-glumarkoj. Li estis prezidanto de la franca asocio de glumarkkolektantoj, "La ĉielarko", kiu okupiĝis pri tutmondaj kaj ĉiutemaj glumarkoj. Lian imponan kolektitan E-materialon ricevis nia iama samklubano Gustave Chamaret, kiu, kiel teknika desegnisto ĉe la aŭtomobiluzino "Renault", kutimis propramane aranĝi E-filatelajn listojn por siaj korespondamikoj. Tiu suferis ofte pro nervmalsano, tial lli skribis nur sporade. Fine li estis enhospitaligita kaj ekde 1978 ni neniam plu aŭdis de kaj pri li.

Pli proksime al la nuna epoko menciindas la nomo Gaston TREMON, kiu daŭrigis la katalogan laboron de Reinhold JENSEN, same

Georges-Marie SAGET. 8 rue Guérot
ELBEUF
Francujo
mi naskiĝis la 30an/8-82 en Thaon (Vogezioj)
Francujo.
studadis sciencojn ĉe la Universitato de Nancy
1900-1904
esperantistiĝis en januaro 1903
ricevis la Stelon kun ora palmo, por
veterano, en 1937 ĉe la Jubilea Univ. Kongreso
en Varsovio
13 MARS 1956
Elkore salutas
via G. Saget
Mortis la 1an de majo 1968

kiel Richard HIRSCH. Li ja ankaŭ eldonis, post pli ol 10 jara laboro la "Grandan Katalogon de la E-Filatelo", SONG Sheng-tang pro lia kolor-katalogo pri E-pm, Vladimir Vana pro liaj ĉeña kaj esperanta katalogo pri tutaĵoj je la temo Esperanto.


Kial ne paroli ankaŭ pri la dulingva "Pola Filatela Asocio-Krakova Regiono, Tutpollanda Klubo de interesitoj pri Esperanto.

(maldekstre: origina manskribo de Georges Saget)

FANTAZIAĴOJ



| "Sendanta" 300-dinara pm pri la 38-a UK 1953 en Zagreb (YU) |



El la SAT-kongreso en Kazanlak atingis min salutkarto, afrankita per normala pm de 5-levoj kaj krome sendenta 300-dinara jugoslava E-pm. La poŝtisto "dormis" kaj stampis ilin per fuŝa datstampo kaj pli fuŝa memorstampo. Tio komprenebIe ne oficialigas la sendentan, ĉar neniam estis eldonita tia sendata pm. Ĉi-kaze temas pri kopio per kolorkopiilo. Ni metu ĝin en nian rubrikon "kuriozaĵoj". Jen, kio eblas

Ja eĉ tre valoraj mon-biletoj ekzistas, ŝajne abunde, en perfektaj farbkopioj. Ili eĉ cirkulas en komerco. Tiu-kaze eblas paroli pri falsigado, en la kazo de 300--dinara pm certe ne. Tamen videblas granda problemo por la brazilaj sendentaj, negumitaj! Kiu inter ni povas garantii originalecon de akirita brazila sendenta?

Postnoto: Ekzistas kolor-kopioj de multaj E-pm (sen-gumaj).

Nia lingvo uzata de la usona NASA

Iam aperis en Usono kunpreso de dek diversaj "kosmo-pm" pri diversaj spacoflugiloj. Inter ili tri VOYAGER 2. Tiuj nun flugas tra la kosmo por eble trovi ekzistantajn intelektajn vivoformojn ekster nia sunsistemo. La spacoflugiloj kunportas mesaĝon ankaŭ en Esperanto por informi pri la sur-Tera-vivo. Jen la teksto, verkita de Ralph Harry: "...Amikoj, mi parolas al vi el la planedo Tero. Mi reprezentas la landon Aŭstralio, la insula kontinento en la suda hemisfero de nia planedo. Ni strebas vivi en paco kun la popoloj de la tuta mondo, de la tuta kosmo kaj labori kun ili por la komuna bono de ĉiuj, kiuj komprenas. Adiaŭ!"

SATURN VOYAGER 2 29 USA · URANUS VOYAGER 2 29 USA · NEPTUNE VOYAGER 2 29 USA

La tri 29 cendaj pm estas dediĉitaj al la preterflugo de la planedoj Saturno, Urano kaj Neptuno.

Teksto kaj informo de nia Gao Zhenxing el Ĉingdao. Dankon.

Esperanto-bildkartoj/ilustritaj pk.

Ekzistas internacia ne-Esperanto-asocio: "Erinnophilie". En ĝi estas kunigitaj kolektantoj de glumarkoj (nepoŝtaj markoj), alumet-skatoloj/-etikedoj, bildkartoj/ilustritaj poŝtkartoj (Filokartio) k.a. Inter ni ankaŭ estas multaj, kiuj kolektas bildkartojn/ilustritajn poŝtkartojn. Malofte atingas min informoj pri tiuj kartoj, laste de nia Gielert el Olsztyn. Mi decidis noti por vi tiujn kartojn, kiuj lastatempe min atingis kaj mi esperas, ke vi daŭre informas min pri novaperantaj kartoj. Ankau kompletigaj informoj estas bonvenaj.

Ceĥoslovakio

Ili eldonis i.a. jenajn pk: Somera E-Tendaro en Lanĉov (5 fotoj)



Feriado kun Esperanto-Centro de SEA en Poprad



Feriado kun E-Centro de SEA en Poprad (kun 4 fotoj)

Kongresejo de la 13-a UK kaj la nova kongresejo por planita UK en Praha (2 fotoj)

Vizitu Ĉeĥoslovakion (4 fotoj, i.a. la burgruino Trosky)


Saluton el Olomouce (kun 3 fotoj)

Hotel Esperanto (Pribylina) (kun 6 fotoj)

Saluton el Haviřov (kun 5 fotoj)

El CZ ankoraŭ ekzistas multaj aliaj belaj ilustritaj poŝtkartoj kun Esperanto-surpreso(j).

Pollando




Antikvaĵoj de Varmia Regiono, Olsztyn (kun 6 fotoj)

Saluton el Varsovio (kun 5 fotoj)

El la jaro 1921 ekzistas ilustritaj poŝtkartoj de Bialystok kun la E-surpreso: "Bialystok, la naskurbo de Dro. L.L. Zamenhof".

iama GDR



Hoyerswerda salutas vin

Wehlen apud Dresden kun E-surpreso: 1908 parolis Dr. Zamenhof en Wehlen.

Potsdam salutas vin

Korajn salutojn el Jena (kun 5 fotoj)

Rostock 85 jaroj Esperanto-Grupo 10. 10. 1993

Salutojn el Templin (kun 3 fotoj kaj E-stelo)


Ekzistas ankoraŭ multaj aliaj ilustritaj poŝtkartoj. Oni ne povas listigi ilin en tiu mallonga enkonduko.


Hispanujo

Menciindas, ke miloj da hispanaj ilustritaj kartoj surhavas, maldekstre de la pm, surpreso en 10 lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto:

"La poŝtkarto de la amikeco"

Tiuj pk ne nur haveblas en la hispanaj turistaj centroj, sed ankaŭ sur hispanaj insuloj: Kanariaj insuloj kaj la Balearoj (Mallorca ktp.). Tio estas bona varbado.





| Jugoslvaio |

Bildkarto pri skulptaĵo de Julio Baghy (eldonejo ITES 1975)

| Nederlando |

Diversaj serioj de kartoj kun belaj bildoj kaj E-kaj Zamenhof-monumentoj.

| P.R. Ĉinio |

Serio: Ruĝa Signallanterno: scenoj el teatraĵoj
Serio: Krizantemo; serio: "Bonsai"; serio: Urboj; serio: Rozoj

Ĉina E-eldonejo eldonis ankaŭ aliajn seriojn, sed mi ne scias pri ili.

-71-a UK (4 fotoj kun kgr. emblemo kaj teksto: "El Guilin")
-Poeto Li Bai kaj Lianbi (eld. de Marko-kompanio Anhui)

| Anglujo |

-74-a UK en Brighton (Marborda Promenejo kun kgr. emblemo)

| Sovetunio |

Hotelo Drogobiĉ ("Ni salutas vin Bonvenon"), Fakte temas pri TUT-poŝtkarto kun surpresita 3 kopeka pm kaj private alpresita E-teksto pri la urbo Drogobiĉ en Ukrainio. Estas imageble, ke ankaŭ aliaj kartoj ekzistas kun surpreso (1989) Kiu scias detalojn?

| G r a n d a   p e t o   a l   ĉ i u j |

Se aperas en via lando nova E-filatelaĵo aŭ glm, sciigu al la redaktoro!!



BONDEZIRAS POR
KRISTFESTO KAJ NOVJARO

La estraro de ELF-AREK
kaj la redakcio de LVL



ANONCOJ

Ĉinaj pm antaŭ 1949 el ĉiuj teritorioj aĉetas sveda kolektanto.
Viajn ofertojn sendu al la redaktoro. Li peras tiujn.

****

Informo

Se vi deziras ion anonci en LVL (senpage), skribu al la redaktoro.

STAMPOBANKO

Nia stampobanko atentigas, ke la lasta oferto ankoraŭ validas. Vi ankaŭ povas peti ĝin de s-ro Werner Heimlich (adreso sube) kontraŭ aldono de 1 IRK.

Bedaŭrinde la forvendo de materialoj, kiuj ofertas nia stampobanko, lastatempe iom stagnas. Rigardu al viaj kolektoj, certe mankas ankaŭ al vi la lastaj novaĵoj.







Informilo de ELF-AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe Esperanto i. BdPh e.V.

Redakcio ĉe:	Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62 D-09123 Chemnitz
Prezidanto:	Ivar Paulsson, Skvtteholmsvägen 29 S-17144 Solna
Kasisto:	Rolf Beau, Jacobstr. 9 D-04105 Leipzig
Banko:	Sparkasse Leipzig, Konto-No: 309 022 320 Bankkodnr(BLZ): 860 555 92
Stampobanko:	Werner Heimlich, Fröbelstr. 4 D-29614 Soltau
Kompostis+ ekspedis	Richard Hirsch, Lambertstr. 12 D-36251 Bad Hersfeld
Presado:	Albert Oesterle, Hubertusstr. 28 D-85650 Wemding